Matthew Gregory Lewis ,

Ĉe la bordo de Alano

tradukita de W. M. Page

Ĉe la bordo de Alano
estis en printempa hor'
la filin' de muelisto
bela, kiel flor'.
Amindumis ŝin soldato;
dolĉajn vortojn diris li -
Ĉe la bordo de Alano
gaja estis ŝi.

Ĉe la bordo de Alano,
post forpaso de l'somer',
la filin' de muelisto
staris sen esoer'.
Ĉar forestis la soldato,
malfidela estis li -
ĉe la bordo de Alano
ĉiam ploris ŝi.

Ĉe la bordo de Alano,
en malvarma vintra hor',
al filin' de muelisto
ekrompiĝis kor'.
For de zorgo kaj malvarmo
per la morto pasis ŝi;
al la bordo de Alano
ne plu venos ŝi.

Traduko de la Angla poemo "Banks of the Allan Water" de MATTHEW GREGORY LEWIS *(*1775-07-09 – †1818-05-14) en Esperanton de W. M. Page.*

Arg-1020-2065 (2014-05-22 15:06:23)

Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt und Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio; sur la paĝoj 49 kaj 50. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann. La teksto troviĝas ankaŭ en la retejo `http://kantaro.ikso.net/cxe_la_bordo_de_alano`.